

ROK XXIV.
MAJ 1930.
N-r 5.



JARO XXIV.
MAJO 1930.
N-o 5.

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.



Akvofalo Siklava en la montoj Tatry.

ESPERANTYSTA POLSKI
POLA ESPERANTISTO

**WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW**

**ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34
REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO**

**PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towa-
rzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jed-
nym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.**

**ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperan-
tistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—
Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.**

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—

Enpaĝu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

Mi deziras interkorespondadi kun geesperantistoj de la tuta mondo.

Tuja respondo. Skribu al:

Stanislavo Roman, Mława, str. Dzierżgowska 8.

Województwo warszawskie.

TREŚĆ — ENHAVO:

**MARJA KAZANOWICZÓWNA: JAN KOCHANOWSKI. DU LE-
TEROJ EL NEDERLANDO. GRAVA SCIIGO. JULIA ISBRUCKER:
DUA INTERNACIA PEDAGOGIA KURSO DE ANDREO ĈE. VI-
TAŬTO LA GRANDA. JAN LANKAU: KAPREOLINETO. S. A.
KOWICZ: BIBLIOGRAFIO. DR. ADAM GADOMSKI: POLAJ
SCIENCAJ ATINGAJOJ EN GEOGRAFIO. KOMUNIKOJ DE
P. E. D. SCIIGOJ PRI POLLANDA ESPERANTO-INSTITUTO.
TRADUKA KONKURSO. POLLANDA KRONIKO. ANTAŬ LA
XXIII-A EN 1931. EN KRAKÓW. BULTENO DE U. E. A. DE LA
REDAKCIO.**

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIV JARO

KRAKÓW
MAJ 1930 MAJO

Nr 5 N-o

JAN KOCHANOWSKI.

En junio de l' nuna jaro ni solenas 400-jaran datrevenon de naskiĝo de Jan Kochanowski (koĥanofski), unu el plej grandaj poetoj polaj en XVI jarcento. Ni ne posedas multajn detalojn pri lia vivo, kaj precipe pri lia infanaĝo. Ni scias, ke 14-jara li aliĝis al Krakova Akademio; kiel longe li tie restadis, estas ne konate. Ekameĝinte antikvan poezion, al ĝi li dediĉis siajn studojn, kaj avida pri plua scio, kiel dudekjara junulo li forveturis eksterlanden. Li vojaĝis tra Germanujo, Italujo kaj Francujo. Plej longe li restadis en Italujo en Padova kaj Venezia, kie li mirigis kaj favorigis por si profesorojn per sia belega poezio latina. Tiu ĉi poezio rilate al boneĝeco de l' formo egalvaloras kun la poezio de l' plej famaj humanistoj ne nur polaj, kiel Janicki, Dantyszek, Krzycki (elp. dantišek, kšicki), sed ankaŭ eksterlandaj.

Kochanowski estas humanisto kun tre vasta instruiteco, ne postrestanta post francaj kaj germanaj majstroj de l' vorto kaj pensuloj de l' XVI jrc., kaj multajn el ili superas.

Koncerne polan poezion jen ĝi ĉe Kochanowski altiĝas al la ne konataj ĝis nun suproj tiel rilate al enhavo kiel al formo. Kochanowski do estas la kreinto de l' poezio en Polujo kaj posedas honoran nomon de „patro de pola poezio“.

Kochanowski komencis skribi pole sub influo de grandaj humanistoj italaj kaj francaj, kiuj tiam forjetis latinon favore al naciaj lingvoj. Tiurilate antaŭ ĉio influis Kochanowski'n la restado en Francujo kaj precipe proksima interkono kun Ronsard. Guste la plej granda merito de K. estas kreo de hejma poezio per havigo al ĝi de bela kaj viva lingvo kaj de ne konata formriĉo. Kiel homo kun ne kutima talento, posedanta ankaŭ maloftan tiutempe arteman senton, sciis K. doni al sia poezio belan stilon, konkordan kun la enhavo, kaj tiu ĉi ree boneĝe harmoniis kun formo de la verko.

K. estis antaŭ ĉio lirikisto, sed pruvis siajn grandajn kapablojn en skribado de satiroj, li skribis ankaŭ unuan polan tragedion, prenante kiel modelon la antikvajn tragediistojn: Sofokles kaj Eurypides. Tiu ĉi tragedio titolita „Rifuzo al grekaj senditoj“ kunigas en si bonegan formon kaj antikvan enhavon kun pola nacia vivo.

Estante precipe lirikisto, K. skribis pri ĉio, kion li amis kaj sentis, kaj nome: pri Dio, patrujo, pri ĉirkaŭanta lin kaj profunde pri-

sentata naturo, pri vivĝojo, ĉarmo de vilaĝa trankvilo kaj publikaj aferoj, pri kiuj skribante li kuraĝe riproĉis erarojn de sia socio. Unu el plej grandaj kaj pleje konataj liaj lirikaĵoj estas „Lamentadoj“, en kiuj la poeto priploras morton de sia tro frue mortinta, plej amata filineto Ursula. La Lamentadoj, en nombro deknaŭ, formas belan tuton. Ĉi formo la unuan fojon montriĝas en pola poezio, kaj ĝia modelo estas ankaŭ en amegita de K. poezio antikva (ekz. Tristia de Ovido).

Kochanowski'n karakterizis honesta kaj ne kutime nobla karaktero, amo al naciaj kutimoj kaj malofte renkontata senpretendemo. Li ne skribis por profito, ne skribis por instrui la socion, sed por la amo al poezio, kiel li mem diras: „mi kantas por mi kaj la Muzoj“...

Kochanowski jam naskiĝis poeto kaj la poezio estis por li tio, kio la suno por la floro. Tiel do li havas la unuan lokon en poezio de XVI jrc., kaj unu el unuaj en tuta poezia pola arto. Tiun sian pozicion en la patruja poezio konis K. dirante: „Mi, la unua ekstaris sur roko de Kaliopo, kie ĝis nun ne estis eĉ postsigno de pola piedo“.

Marja Kazanowiczówna.

DU LETEROJ EL NEDERLANDO.

Interesaj prelegoj pri POLUJO de Prof. Dro Odo BUJWID.

S-ino Isbrücker, la konata Nederlanda Esperantistino kaj I. C. K.-ano, akiris de Prof. Bujwid lian pretecon vojaĝi Nederlandon, pasintan vintron, por doni paroladon pri Polujo en Hago. Kompreneble, kiam tio konatiĝis en la lando, ankaŭ aliaj urboj de Nederlando sin anoncis por havi la profiton aŭdi prelegon de mondfama scienculo, ĉar tio ja ne okazas ĉiutage. Post kelka interkorespondado, unuflanke kun Prof. Bujwid, kaj aliflanke kun diversaj Nederlandaj urboj, oni decidis, ke la prelegoj okazos: la 12-an de IV en HAGO, la 14-an en LEEUWARDEN, la 15-an en AMSTERDAM, la 16-an en UTREĤT, la 17-an en ARNHEM kaj la 18-an en DORDREĤT. La lokaj Rondoĵoj en tiuj urboj tuj komencis konvenan aranĝon, ne nur por ekspluati por propagando kiom plej efike la okazon, sed ankaŭ por havigi al la parolonto iomete agrablan restadon en Nederlando. Kaj estas tre mirinda afero, ke en tiuj urboj, kiel Hago kaj Utreĥt, kiuj posedas pliajn diverspartiajn Rondoĵojn, oni flankenŝovis la diverspartiecon, kaj kunlaboris por havi la plej grandan sukceson. En Hago kunlaboris la UEA-anaro kun 3 lokaj unuigoj. Kiel tia — preskaŭ kompleta — intergrupa kunlaboro estis ebla? Pro la simpla fakto, ke la tuta afero koncernis purlingvan celon; neniu politika aŭ religia temo estis pritraktota, kaj Prof. Bujwid tion tutklare komprenis, evitante en sia prelego iun ajn flankeniĝon de la neŭtraleco.

Li unue priskribis ion pri la historio de Polujo, speciale dum la lastaj 10 jaroj, la „renaskiĝo“ de la ŝtato, kaj nur malmultaj el la aŭskultantoj sciis la malfacilaĵojn, kiuj ekzistis por reunuigi la tri partojn, separatajn dum pli ol jarcento. Poste ni aŭdis detalojn pri la trezoroj en la tero de Polujo, la kreskantaj industrioj, la vidindaĵoj, speciale en „Malgranda“ Polujo, la reĝaj tomboj en Kraków, la Universitatoj, ktp. ktp. kaj laste pri la grandnombro da geniuloj, kiel

Kopernik, Wit Stwosz, Curie, Sienkiewicz, Zamenhof, ktp. P-ro Bujwid klarigis la paroladon per lumbildoj, inter kiuj kelkaj naturkoloritaj, eksplodigis kriojn de admiro.

En Amsterdam ĉeestis la prelegon la tiea Pola Konsulo, S-ro Bückmann, kaj en Hago troviĝis inter la pli ol 150 aŭskultantoj, lia ambasadora moŝto S-ro Stanisław Kętrzyński kun edzino, kaj kelkaj ambasadoraj oficistoj, kiuj ĉiuj ĉeestis la kunvenon de komenco ĝis fino. La Pola ministro de eksterlandaj aferoj estis sendinta kvanton da libroj pri Polujo en diversaj lingvoj, kaj 150 ekz. de **esperantlingva** gvidlibro pri Polujo estis disvenditaj en la diversaj urboj. Dum la lasta kunveno, en Dordrecht, mi havis okazon danki P-ron Bujwid pro liaj prelegoj, kiuj rimarkeble pligrandigis nian scion pri unu el la plej interesaj popoloj de Eŭropo, kaj transdoni al via samlandano, kiel memorigaĵon, arĝentan klompeton *), objekton, kiu tipe karakterizas Nederlandon.

Inĝ. M. F. Onnen.

DUA LETERO.

Merkredon la 16-an de Aprilo alvenis en nia urbo la famkonata profesoro Bujwid el Kraków.

Kun alia Esperantisto mi havis la grandan honoron bonvenigi lin ĉe la stacidomo.

Prof. Bujwid parolados ĉe ni pri Polujo. Ni ĉiuj jam aŭdis pri li, ne nur kiel kuracisto, sed ankaŭ kiel lerta Esperantisto, kiel redaktoro de la Pola Esp. gazeto. Lia nomo donis al ni la certecon, ke lia parolado estos ne nur bona esperanto, sed ankaŭ tre interesa.

Ni kondukis lin al la hotelo, kie la profesoro devis ankoraŭ skribi kelkajn leterojn kaj je la 6-a ni revenis por konduki lin al la kunveno. Sed ĉe la hotelo atendis nin alia surprizo. Ni konatiĝis kun S-ro Ir. M. F. Onnen el Hago, la ĉefdelegito de U. E. A. en Nederlando. Kvarope ni foriris kaj jam atendis nin kun malpacienca la aliaj membroj kaj invitintoj.

La propaganda vespero estis organizita de la du unuiĝoj en Utreĥto nome: „la Utreĥta Esp. Rondo“ kaj „la Kruco en la verda Stelo“.

La prezidanto de U. E. A. bonvenigis Prof. Dron Bujwid en la nomo de ambaŭ societoj kaj rakontis ion pri li, liaj verkoj, k. t. p. F-ino To Tulkens ludis sur la orgeno la polan nacian himnon, la ĉeestantoj starante aŭskultis ĝin.

Poste prof. Bujwid komencis sian paroladon. Antaŭ 16 jaroj — li diris — Polujo ne ankoraŭ troviĝis sur la landkarto de Eŭropo, kvankam preskaŭ 30.000.000 da loĝantoj parolis la polan lingvon kaj la nacio havis kulturon de milo da jaroj. Post la revivigo kaj la unuiĝo de la tri partoj, kiuj havis malsamajn leĝojn kaj monistemojn, kaj kiuj perdis en la mondmilito multegajn, junajn virojn formiĝis, en mallonga tempo granda, forta ŝtato kun firma valuto kaj vigla ekonomia evoluo. Ĝi okupas 300.000 km²; laŭ la vasteco ĝi estas la 6-a, laŭ la loĝantaro la 4-a lando de Eŭropo. Ĝi estas precipe agrikultura ŝtato, sed lastatempe ankaŭ kreskas multaj industrioj. La karbomi-

*) „Klomp“ estas la Nederlanda nomo de speco de ligna ŝuo, kiun la komparanoj bezonas por labori en kotajoj.

nejoj estas riĉaj, kaj plue oni ankaŭ trovas petrolon, zinkon, plumbon, natri- kaj kalialon. Troviĝas vastaj teksejoj kaj ĥemiaj industrioj.

En Polujo estas multaj arĥitektaj vidindaĵoj el la tempo de polaj reĝoj, kies tomboj, bone konservitaj, troviĝas en Kraków. Ankaŭ en Danzig, kiu antaŭe estis parto de Polujo, oni trovas polajn monumentojn. En Vilno multaj preĝejoj estas konstruitaj de polaj reĝoj aŭ grafoj. Estas ankaŭ pentrindaj pejzaĝoj, speciale en „Malgranda Polujo“ kie oni trovas banlokojn kaj ĝuas vintrosporton.

Polujo havas ses Universitatojn, 2 politeĥnikajn altlernejojn, 2 arto-akademiojn kaj multajn aliajn institutojn por mezgrada instruado.

El la geniuloj de la antaŭa tempo Prof. Bujwid memorigis al ni Nikolaon Kopernikus, lernanton de la Krakova universitato, Wit Stwosz, faman skulptiston. El la geniuloj de la nuna tempo ni aŭdis pri Mario Curie-Skłodowska, la eltrovinto de radiumo, Siemiradzki, fama pentristo, Sienkiewicz, la verkinto de Quo Vadis, Matejko kaj aliaj. Ankaŭ la aŭtoro de Esp. Dro L. L. Zamenhof estis Pollandano.

Post mallonga paŭzo fino W. Krap kantis: „O Eurkeit“ de J. S. Bach kaj „Rinaldo“ kaj „Xerxes“ de Händel kaj poste ni vidis belegajn lumbildojn kun kompletigo de Prof. Bujwid.

La prezidanto dankis la profesoron por la parolado kaj la lumbildoj, kaj ĉiuj reiris hejmen, kontentaj eĉ entuziasmaj.

La sekvontan matenon, jam tre frue, ni kondukis la profesoron tra la urbo, kie ni montris al li la plej altan turon de Nederlando kaj la belegan, gotikan katedralon.

Jam tro rapide venis la horo de adiaŭo, ni direktis nin al la stacidomo, la vagonaro alvenis kaj... Ĝis revido, ĝis revido, eble en Kraków.

Utreĥto, 19. 4. 1930.

W. A. M. van Dijk,
sekretariino de la Kruco en la verda Stelo.

GRAVA SCIIGO.

En la lastmonata n-ro de P. E. ni donis sub la sama titolo gravan sciigon pri la interŝtata kaj internacia lerneja intersanĝado. Nune ni kompletigas la informon. **Red.**

Brazila Ligo Esperantista eksciinte pri la kreado de la „Interŝtata kaj Internacia Lerneja Intersanĝo-Servo“ ĉe la publikaj lernejoj en Rio de Janeiro, tuj proponis sian helpon al S-ro Direktoro de la Publika Instruado, D-ro Fernando de Azevedo, por la tradukado de la korespondadoj ricevitaĵoj kaj sendotaj en Esperanto.

Dankante tiun proponon skribis al Brazila Ligo Esperantista S-ro D-ro Jonathas Serrano, Teknika Sub-direktoro de tiu Departamento, kaj ĝi sendis la unuan numeron de la oficiala „Bulteno de Publika Edukado“, kiu publikigis artikolon de Prof. D-ro Everardo Backheuser tradukitan el la „Internacia Pedagogia Revuo“. Sur la koverto de tiu ĉi bulteno oni legas skribaĵojn en kvar naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto.

Sekve de tiu kontentiga akcepto B. L. E. dissendis cirkuleron, kiu enhavas kelkajn plej interesajn punktojn de la dekreto kreinta tiun Servon, al la gravaj revuoj kaj gazetoj, naciaj societoj kaj deligitoj de U. E. A.

La EDUKA KONSILANTARO, ĉe kunsido prezidita de D-ro Fernando de Azevedo, ordonis la transskribon de tiu cirkulero, en Esperanto kaj portugale. Kun la celo danki tiun helpon S-roj Couto Fernandes kaj Carlos Domingues, estraranoj de B. L. E., vizitis D-ron Jonathas Serrano kaj tiam ili plejplezure konstatis ke li bone sciavas Esperanton kaj jam de multaj jaroj tre interese akompanis ĝian progreson. D-ro J. Serrano interparoladis kun la estraranoj de B. L. E. pri la rimedoj akceli la propagandon de Esperanto ĉe la instruistara rondo kaj promesis sian helpon tiucele.

Post kelkaj tagoj aperis en la oficiala organo „Jornal do Brasil“, oficiala sciigo de la Teknika Sub-direktoro pri la propono de B. L. E. kaj ĝia akcepto de la Direktoro de la Publika Instruado.

B. L. E. petis ke oni sendu gratulojn laŭ la jena adreso:

D-ro FERNANDO DE AZEVEDO, Direktoro de la Publika Instruado,
Rua da Gloria, 26, Rio de Janeiro — BRAZILIO

OFICIALA SCIIGO.

S-roj lernejoj inspektoroj kaj direktoroj kaj instruistoj.

Mi sciigas vin ke **Brazila Ligo Esperantista** proponis traduki ĉen la internacian lingvon Esperanto leterojn, poŝtkartojn aŭ alian korespondajon, kiujn, laŭ la lerneja interŝanĝado, la lernantoj deziros sendi eksterlanden, speciale al la landoj, kies lingvoj estas malpli konataj ĉe ni (Rusujo, Persujo, Ĥinujo, Japanujo, Germanujo, Aŭstrujo, baltaj kaj skandinavaj landoj, ks.). Ĝi estas ankaŭ preta traduki portugalen la tie ĉi ricevitajn esperantan korespondajon.

En sia sidejo (Placo 15 de Novembro 101, 2a. etaĝo), **Brazila Ligo Esperantista** donos al la interesuloj ĉiujn klarigojn.

Distrikto Federala, 12-an de Marto 1930. (s) Jonathas Serano.
Teknika Sub-Direktoro.

DUA INTERNACIA PEDAGOGIA KURSO DE ANDREO ĈE

Arnhem (Nederlando), 17—29 Julio.

La dua internacia pedagogia kurso de Esperanto sub la gvidado de pastro Andreo Ĉe estos aranĝata de la urbestro de Arnhem, la fame konata belega ĝardenurbo de Nederlando, apud la Rejno.

La kurso daŭros dum la 17—29a de Julio 1930, en 11 labortagoj, kun po 4 lernhoroj ĉiutage, sen uzo de nacia lingvo, sen lernolibroj kaj hejma laboro kaj kapabligos al facila konversacio en Esperanto pri ĉiutagaj aferoj.

La ĉefa celo de la kurso estos prepari Esperanto-instruantojn kaj diskonigi la sukcesplenan instrumentodon de Andreo Ĉe.

Ĉiu kursano ricevos de la urbestro de Arnhem ateston pri la partopreno.

Dank' al malavara subteno de la urbestro de Arnhem la kursanoj povos ĝui la jenajn favorojn:

1) 15 (dekkvin) eksterlandaj gekursanoj estos gastoj de la urbo Arnhem, tio signifas, ke ili ricevos la loĝon kaj manĝon senpage dum la tuta kurso,

2) 60 (sesdek) personoj povos ricevi favorajn lokojn tiel, ke ili devos pagi por unu tago 2.— aŭ 2½.— guldenojn (4.— aŭ 5.— sviasajn frankojn) por kompleta pensio.

La kursanoj, kiuj ĝuas favoron, loĝos en la belega Oolgaardt-domo, speciale fondita por konferencoj kaj kursoj. La domo kuŝas sur la alta bordo de la Rejno kaj donas grandiozan vidaĵon ĝis trans la germanaj landlimoj. Por la komforto de la gastoj la domo enhavas belajn legsalonojn, fluantan akvon, banĉambron kaj malluman ĉambreton por foto-laboroj.

En la favoraj lokoj la dormejoj estas komunaj.

Por personoj, kiuj ne deziras favoran lokon, la kursestraro luas privatajn pensiojn je la prezo de 3 guldenoj tage aŭ pli.

La kurslecionoj okazos matene. Dum la posttagmezoj kaj vesperoj oni aranĝos ekskursojn tra la ĉirkaŭaĵoj de Arnhem, la plej bela regiono de Nederlando, kune kun la loka kaj regiona Esperantistaro. Krom tio okazos ekskursoj al la plej gravaj vidindaĵoj de Nederlando (Amsterdam, Hago, Utrecht, insulo Marken, sekigaj laboroj de la Suda Maro k. t. p.). Partopreno en la ekskursoj estos laŭvola.

La kurso komenciĝos la 17-an de Julio matene je la 9-a horo en la urba knabina reallernejo kaj finiĝos la 29-an de Julio vespere per ĝardena festo.

Kursanoj, kiuj partoprenos la Universalan Kongreson en Oxford, povos forveturi el Arnhem la 30-an de Julio frumatene al Hago, dum la tago rigardi la vidindaĵojn de Hago, de tie posttagmeze forveturi al Rotterdam kaj vespere per ŝipo al Anglujo, kun la karavanoj.

En la kurso povas partopreni ĉiunaciaj profesiaj ĝeinstruistoj, kiuj aŭ ankoraŭ ne scias Esperanton, aŭ jam scias ĝin, kaj krome personoj, kiuj okupas sin per instruado de Esperanto.

La kurskotizo estas 5 guldenoj, sendotaj kune kun la aliĝo al la kursdirekcio sub la adreso de S-ino Julia Isbrücker, Hago, Oostduinlaan 32 (poŝtĉeka konto: 10866, J. R. G. Isbrücker, Hago).

Aliĝante oni bonvolu komuniki la nomon, precizan titolon, adreson, deziron pri favora loko, ĉu jam Esperantisto aŭ ne, precizan tempon de alveno.

Limtempo por la aliĝo: la 1-a de Julio.

Estas konsilinde aliĝi kiel eble plej baldaŭ, ĉar la favoraj lokoj estos disdonataj al la frue aliĝintaj kursanoj.

Dum la 16-a de Julio funkcios akceptejo en la stacidomo de Arnhem.

Ni insiste petas, ke la Esperantistaro bonvolu urĝe kaj vaste diskonigi la supraĵajn informojn al la ĝeinstruistaro de sia lando, speciale per artikoloj en la instruistaj fakaj ĝezetoj.

Hago, la 25-an de Aprilo 1930.

La Organiza Komitato de la Dua Internacia Pedagogia Kurso de Esperanto:

Julia Isbrücker, Oostduinlaan 32.

Vitaŭto la Granda.

De nia samideano kaj leganto, K. Vidikauskas el Filadelfio, Usono, ni ricevis sekvantan versajeton, verkitan okaze de 500-jara datreveno de morto de la fama reĝo de Litovoj.

Forpasis kvincento da jaroj
De l' tempo kiam Vitaŭto,
Pri kiu aŭdiĝu nun laŭto,
Korpe forlasis Litovion,
Iris vivadi ĉielon,
Litovio perdis genion
En Li kaj brilegan stelon,
Kiu dum batal' por libero
Briladis nur por Litovoj...
Do, sonu kant' de l' tuta tero
Por Li, eĉ dum ventaj blovoj...
Por Li, plej granda nia Viro
Kaj reĝo de Litovio,
Kies korpo kuŝas sen spiro,
Sed anim' vivas ĉe Dio.

KAPREOLINETO.

Antaŭ kelkaj tagoj ektintis en mia ĉambro la telefona sonorilo.

— Halo! kiu parolas? — mi demandis malvarme.

— Divenu — respondis argenta virgulina voĉeto.

— Bedaŭrinde, mi ne rekonas...

— Ho, estas tre malbele! Mi ne volas tamen trouzi vian paciencon, tial mi diras al vi, ke parolas nekonatulinino, laŭdire... beleta... sed ne, ĉar malbela kaj abomena, tamen iomete aminda. Krom tio maliuna, ĉar jam dudekjara...

— Ha... ha... ha...

— Tiu nekonatulinino treege interesiĝas pri vi...

— Ĉu?

— Jes, kaj tial morgaŭ je l' deknua denove telefonos...

— Nu, bone, tamen bonvolu malkaŝi al mi almenaŭ la nomon...

— Ne... ne... neeble. Provizore nomu min enpense Kapreolineto, ĉu bone?

— Bonege, do Kapreolineto, tio estas iu kun nigraj kaj malgiaj okuloj, milda kaj timema...

— Jes milda kaj timema, kaj nun adiaŭ. Adiaŭ ĝis morgaŭ!

— Ĝis la revido!

Mi volus renkonti viron, kiu tiaspecan telefonajn akceptus indifere. Tial mi ankaŭ post nedormita nokto kun kor' tremanta atendis la deknunan.

La sekvintan tagon akurate je l' interkonsentita horo denove ektintis la sonorilo.

— Halo, kiu parolas?

— Kapreolineto.

— Ah, Kapreolineto, kiel mi ĝojas.

— Ĉu vi pensis pri mi?

— Jes.

— Kaj ĉu vi sopiris je mi?

— Senlime.

— Do mi skribos al vi morgaŭ leteron.

— Mi estos tre danka, eble tamen ni povus nin renkonti hodiaŭ vespere, ekzemple en „Mirajo“.

— Ne, ne, estas neeble!

— Kial?

— Ĝi estus tro banala. Ni devas antaŭe proksimiĝi reciproke spirite...

— Per telefono!

— Per telefono. Kaj nun bonvolu doni al mi parolon de honoro, ke mian deziron, kiun vi morgaŭ ricevos letere, vi plenumos senrezerve...

— Se mi nur povos...

— Oho, jam hezito...

— Do parolon de honoro, mi plenumos!

— Tion mi ŝatas. Do, kara, amata... adiaŭ...!

La sekvintan tagon venis la varme atendata letero. Mi malfermis ĝin kun koro tremanta kaj tralegis sekvantajn:

„Karulo! Mi ne dubas, ke vi tenos la donitan parolono de honoro kaj aĉetos 10 paketojn da vera, plenefika pulvoro kontraŭrata „Klapso“, fabrikata de magistro Mensogeno. Aĉetebla en ĉiuj drogejoj kaj apotekoj. Al revendistoj rabato. Adiaŭ Kapreolino“.

Kaj nun mi havas proceson. La parolon, kiel honorulo, mi tenis, tamen reveninte hejmen pro furiozo mi eljetis ĉiujn pakajojn kun la kontraŭrata pulvoro kaj kelkajn ankoraŭ aliajn pezajn objektojn tra l' fenestro, trafante per ili la nazon de ĝuste preterpasinta Marjano Kaserolo, edzino de domgardisto kaj patrino de ses infanoj, kiu kompreneble tuj akuzis min en la juĝejo pro krimo de grava kaj intencita korpodifekto, kalkulante sian doloron je 1000 fr. kaj la malbeligon de l' vizaĝo (!) je 5000 fr.

Mi malgajnos certege. Eble nur la juĝisto konsideros iun mildigan cirkonstancon, nome ke mi plenumis tiun ĉi krimon en la stato de momenta mensa senkonscio. Sed ĉu oni povas estis konscia, se la ĉarma sonĝo pri amo montriĝis reklama artifiko de fabrikanto de kontraŭrata pulvoro, magistro Mensogeno.

Laŭ Jan Lankau espertantigis

Mi Ankaŭ.

BIBLIOGRAFIO.

Estimata Sinjoro Redaktoro kaj Karaj Gesamideanoj!

Eble vi ankoraŭ neniam legis la bibliografian fakon en kies komenco staris tiuj kortuŝaj vortoj de l' alvoko. Mi tuj klarigos al Vi kial mi faris tion: bibliografiaj anguloj en nia gazetaro estas ĉiam tre seriozaj, ĉar en ili skribas tre seriozaj homoj, ofte kun seriozegaj literoj „L. K.“ ĉe la familia nomo. Sed mi, male, estas malserioza homaĉo, sen familnoma vosteto, kiu volas hodiaŭ skribi neseriozan recenzon pri unu neserioza libro. Por defendi mian krimplanan deziron mi devas turni vian atenton je fakto, ke nun eĉ seriozaj journaloj gastigas la neseriozulojn; ekz. la raporton (kaj spritegan raporton!) pri la Budapeŝta Kongreso en serioza „Esperanto“

skribis „fuŝista“ Joŝo, kiu en privata vivo estas tre serioza homo, kiel mi. Tiu malseriozece venenas eĉ seriozan nacian ĵurnalaron. Ekz. en tre faka jurista „Głos Sądownicwa“ (Voĉo de juĝantaro) ĉijare, unu el la plej majestaj polaj juĝistoj presis artikolon, glorigantan „neseriozecon“, kiu enŝoviĝis ankaŭ en la tonojn de tiu „voĉo“, — do mi pensas, ke post tiu antaŭparolo vi permesos al mi hodiaŭ preparoli la libreton, kiu antaŭ nelonge estas presita pollingve; en ĝi nia simpatia Charlie Chaplin rakontas pri sia vojaĝo Eŭropon. Jes, la temo estas malserioza, sed konfesu, ke vi ofte revenadis hejmen el „kino“ dankante al ĉarma Charlie pro kelke da horoj de sincera, freŝa rido, de tiu rido, kiu tiom mankas al ni nun, post la milito!

Do, tiu Charlie verkis la libron: „miaj eŭropaj impresoj“. Certe, li estas pli talenta artisto, ol verkisto, sed en tiu libro estas du momentoj, kiuj povas ekinteresi ankaŭ nin, esperantistojn.

Charlie, riĉega homo, homo, kiun atendas ĉiustacie miloj da homoj; miloj postulas lian aŭtografon (ĉapelo, bastono, botoj — estas vizitkarto de Charlie) — tiu homo konas siajn valorojn, do la amasojn da kriantaj homoj li opinias normala sento de homaro por sia genio! La tuta mondo estas ĉe liaj piedoj. Ne nur aroj da kriantaj homoj, sed eĉ reĝinoj, eĉ reĝinoj de beleco. Tiu homo komprenas, ke en la mondo estas nur sola Charlie Chaplin. Sed estas momento, kiam li, tiu riĉa, genia, potenca homo estas muta kiel blekanta kreitajo... kaj en lia cerbo naskiĝas „geniaj“ ideoj, kiujn ni, esperantistoj, jam delonge solvis praktike.

...Charlie enŝipiĝas kaj vojaĝas Francujon, la unuan fojon en sia vivo. La ŝipo alboridiĝas. La homamasoj krias „Charlot, Charlot“, sed potenca, genia. Charlot ne povas ion ajn kompreni, ĉar li... komprenas nenion francan vorton!

...„Estas stranga afero, tiu fremda lingvo“... skribas li kaj miras — „kial oni ne povas enkonduki unu internacian lingvon“?

Poste — interparolado kun gazetuloj.

...„Ni parolas. Komence rapidege, poste iom malpli, fine — silabmaniere. Ni faras ĉion por ke franco komprenu la anglan kaj anglo — la francan... sed senrezulte!

La plej drama lingva momento estas renkonto de Charlie kun sia franca amiko-korespondanto, karikaturisto Cami, kiu sendas siajn desegnaĵojn al Charlie, ricevante de li liajn filmojn. Cami venas, kuras, brakumas Charlie. Sed nenio plu, ĉar li ne komprenas anglan lingvon. Ili provas interkompreniĝi: parolas rapide, malrapide, sed nenia rezulto! Ili konstatas, ke situacio estas sensolva.

Jes, li, potenca, riĉega, ĉiopova Charlie — estas kiel lasta el homoj. Li nenion komprenas kion diras lia amiko. Do li savas la situacion per napoleona gesto: — „sed mi estas ĉiam Chaplin kaj li ĉiam Cami kaj nenio povas difekti nian harmonion!“.

Mi opinias ke tiu majesta „solvo“ tute ne solvas la demandon; mankas por la solvo la ŝlosilo, malgranda „ŝlosilo“ de Cefeĉ: franca por S-ro Cami kaj angla por ĉarma Charlie kaj tiam la demando estos vere solvita. Sinjoroj delegitoj de U. E. A. en Parizo kaj Hollywood — kion Vi pensas pri tio?

...Jen estas la recenzo; kun bedaŭro mi devas konfesi, ke ĝi estas iom pli serioza, ol mi volis, sed mia amatino diris al mi, ke ĝi

estas bonega! Estas nur sola domaĝo ke ŝi estas virino („la donna e mobile“ kiel kantas niaj italaj samideanoj) kaj due, ke ŝi, bedaŭrinde, ne konas Esperanton!

Sed mi havas alian eblecon ekscii, ĉu mia malseriozeco estas bone akceptita de Vi, kara leganto. Ĉar esperantistoj plejparte ne abonas siajn gazetojn, sed legas ilin en Esperantujo — ĉe sia Delegito de UEA, en klubo, kafejo aŭ eĉ simple prunteprenante (sen redono), do ili povos facile montri siajn sentojn: aboni la „Polan Esperantiston“. Se S-ro Redaktoro ekvidos, ke la nombro de abonantoj en tiu ĉi monato duobliĝos, li diros: „ha, tiu artikolaĉo de tiu Kowicz faris sukceson, mi devas mendi la alian“.

Tiamaniere ĉiuj estos kontentaj: serioza redaktoro, malserioza aŭtoro kaj Vi, ho mistera leganto senabona.

S. A. Kowicz.

POLAJ SCIENCAJ ATINGAĴOJ EN GEOGRAFIO.

Nia geografia situo ĉiam eminente influis je disvolviĝo de geografia scienco ĉe ni, kaj intereso por tiu ĉi scienca branĉo ekestis ĉefe sub influo de Renesanco. Ĉe finkliniĝo de mezepoka periodo ekfloris tiu scienco tiel sur reĝa kortego kiel inter pastraro, kaj precipe ĉe Krakova universitato. Tio estas tempoj de Kopernik, kiu polan astronomion starigis sur plej supera nivelo, tempoj, en kiuj polaj scienculoj ne havis por si egalajn kaj per sia famo venigadis arojn de fremduloj, avidaj pri scio, en murojn de Kraków. Kunligite kun la astronomio disvolviĝadis ankaŭ geografiaj konoj, kaj ĉiuj profesoroj de naturhistorio kaj historiistoj prelegis geografion kaj ĝiajn helpsciencojn.

Depost la fino de XV ĝis la duono de XVI jrc. oni povus citi kelkdekonojn da nomoj de polaj geografoj, kaj inter la aro de unuaj pioniroj de tiu scio antaŭpaŝas historiisto kaj geografo Jan Długosz (elp. dūgoŝ) (1415—1480), la aŭtoro de monumenta publikigaĵo s. t. „Chorographia Regni Poloniae“, dokumento de unuaranga valoro en la monda scienco.

En tiu ĉi unua pola geografio donas Długosz bonegan priskribon de montoj kaj akvoj en Polujo. Kvankam meritoj de Długosz, kiel de historiisto estas ĝenerale konataj, tamen oni devas speciale substreki lian signifon kiel de geografo, ne nur landan sed ankaŭ internacian, ĝuste dank' al lia unuaranga pola geografio.

Jan Długosz devas esti rekonita la unua pola geografo kun internacia signifo, kies verko formas la unuan fonton en vico de polaj geografiaj disertacioj. Li unua priskribas 7 ĉefajn riverojn de Polujo kaj parte lokas fontojn de Wolga, Don, Dniepr kaj Dźwina en lago, kio poste fariĝos gvidinformo al geografo Miechowita (mjeĥovita), por liberiĝi de erara opinio pri neekzistantaj Ruseaj montoj. Kredible Długosz utiligis ankaŭ la unuan terkarton de Polujo; kvankam oni ne trovis tiun karton, tamen estas historiaj notoj, ke ĝi ekzistis.

La samon oni devas diri pri la „Historio“ de Długosz, en kiu li entenigis multon da valoraj geografiaj informoj el pasintaj epokoj.

La prelegoj mem en Jagellona Universitato en Kraków estis ĝuste en tiuj tempoj komentariado de aŭtoroj depost Aristoteles ĝis tiamaj majstroj. Plej multe oni konsideris antaŭ ĉio Ptolomeon kaj lian sistemon, plue priskribojn de fremdaj landoj kaj plej novajn geografiajn akirajojn. En tempoj de Renesanco pliiĝis intereso por geografio, kaŭzita de emo al interrilatiĝo kun landoj nove malkovritaj. Ties esprimo estas la unua pola post-Kolumbusa globuso, troviĝanta en Jagellona Biblioteko, tiom pli interesa, ke oni desegnis sur ĝi Amerikon post ĝia malkovro. Mankas sur ĝi Nord-Ameriko, sed estas Suda sub nomo: „Mundus Novus, Terra Sanctae Crucis“. Sud-oriente de Madagaskar estas signita lando kun surskribo: „America noviter reperta“. La globuso estas priskribita de prof. E. Estreicher. La aŭtoro supozas, ke ĝi ekestis ĉ. 1510 j., kiam la malkovro de Ameriko kaj ĝia nomigo estis okanzitajo tute freŝdata. Lokigo de Ameriko sur India Oceano — kiel skribas prof. Estreicher — estas kaŭzita de tio, ke konstruinto de la globuso evidente volis registri la plej novajn geografiajn malkovrojn kaj ankaŭ la jusajn, ke li eĉ ne sciis bone, kie ilin noti kaj tial notis neĝuste. La menciitan globuson prof. Estreicher opinias la plej antikva globuso postkolumba, sur kiu estas signita amerika kontinento sen kontakto kun Azio.

La unua ĉe ni verko, menciata pri Ameriko, kaj jam en 1512 j., estas scienca traktado pri la novaj teroj de Jan de Stobnica, aŭtoro de unua terkarto, eldonita en Polujo. (Antaŭe ekzistis, kiel ekz. ĉe Długosz, terkarto manskribita, kiu nur poste, en XVI jrc., helpis al eldono originale pola. Tamen la unua terkarto, eldonita en Polujo, estas duongloboj de terglobo, troviĝantaj en la libro de Jan de Stobnica).

Jan de Stobnica († ĉ. 1530), prof. de Jagellona Universitato kaj Kolegio de Lubomirski en Poznań, eldonis en j. 1512 en Kraków verkon s. t. „Introductio in Ptolomei Cosmographiam“, kiu poste trifoje represiĝis.

Envere tiu verko ne estas originala, sed aliformigo de verko de M. Waldseemüller, kompletigita per kelkaj geografiaj priskriboj (interalie raporto de pola vojaĝinto al Sankta Tero, Anzelm), tamen ĝi okupas eminentan lokon en historio de geografio en Polujo, kiel popularigo de tiutempa okcidenta scienco, kaj precipe kiel unua ĉe ni verko, menciata pri Ameriko. Aldonitaj al la eldono de 1512 j. duongloboj ne estas originala verko de Jan de Stobnica, sed kopio de vinjetoj el granda terkarto de Waldseemüller el 1507 j., tamen ili posedas valoron kiel unuaj terkarto eldonitaj en Polujo. Krome Jan de Stobnica estas la aŭtoro de tria pola geografia lernolibro por universitata junularo, ĉar por ricevi sciencajn titolojn de magistro aŭ doktoro de filozofio devis la junularo ekzameniĝi ankaŭ pri la geografio.

La unua pola lernolibro (latine) estis „Kosmografio“ de Wawrzyniec Rabe el Nova Środa (konata kiel Laurentius Corvinus Novoforensis), la dua estis lernolibro de Jan el Głogów, la kvara (post tiu de Jan de Stobnica) lernolibro de Jan Honterus en Kronstad en Sepkastellando, tamen en Kraków verkita kaj presita.

Tiuj lernolibroj, simile kiel prelegoj, kelkfoje nur malmulte antaŭiris ne nur aŭtorojn mezepokajn, sed ankaŭ antikvajn, precipe Ptolomeon, kiu tiutempe plej grave influis. Profesoroj estis plejparte

pastroj. El tiuj, kiuj speciale dediĉis sin al la geografio, estis plej famaj (krom la nomitaj jam): Stanisław el Łowicz, Bogucki el Świecie, Maciej Cichosz el Szamotuły. Ĉi tie estas ankaŭ menciindaj astronomoj: Brudzewski, Marcin de Przemyśl kaj Michał el Wrocław, konsiderante iliajn laborojn, fiksitajn situon de unu-opaj urboj.

Grandan signifon en geografio posedas la menciita antaŭe geografo Jan de Głogów († 1507), profesoro de J. U., filozofo, astronomo kaj geografo, kiu ĉe prelegoj de geografio por klarigi al lernantoj konturojn kaj situon de landoj helpuzis la terkartojn aldonitajn al eldono de la geografio de Ptolomeo el 1480 j. Tio estas unu el plej malnovaj konataj al ni helpuzadoj de terkartoj ĉe la prelegoj de l' geografio kaj ni devas speciale tiun fakton substreki.

Jan de Głogów tenis tiel viglan kontakton kun alilandaj instruistuloj, ke li povis konatigi al siaj lernantoj informojn pri la plej lastaj malkovroj de novaj teroj. Tion pruvas liaj raportoj el 1506 j. pri malkovroj kaj vojaĝoj de portugaloj ĵus tiam okazigataj.

Kiel vige oni interesis sin en Polujo pri tiuj malkovroj, pruvas la fakto, ke Krakova kanoniko Maciej el Miechów kolektadis krom sciigoj eĉ terkartojn de nove malkovritaj landoj, kaj la verko de tiu aŭtoro: „Tractatus de duobus Sarmatiis”, eldonita en 1517 j. en Kraków, kaŭzis grandan sensacion en tiama mondo, kies pruvo estis 10 eldonoj latinaj, 4 it-laj kaj unu germana. La verko elvokis viglan polemikon. ĉar la aŭtoro kuraĝis kontraŭstari la asertojn de Ptolomeo, dirante, ke la riveroj de Orient-Eŭropo, kiel Dniepr, Don, Dźwina kaj Wołga, ne elfluas el fikтивaj montoj Rifeaj kaj Hiperboreaj, sed el lagoj en lando „plata kaj marĉoplana”. Do Maciej el Miechów estas aŭtoro de unua terkarto de Sarmatio, ampleksanta landojn de rivero Odra ĝis Kaspia Maro.

Maciej el Miechów la unua precizigis fontojn de Wołga, Don, Dniepr kaj Dźwina, signante sur sia terkarto distancojn de apartaj landoj. Li, la unua prezentis tiamaniere potencon de Slavujo kaj teritorion de ĝia kulturo kaj lingvo, kaj same en sia verko resumis laŭdindajn efikojn de laboro de Poloj en historio de ekkono de sekretoj de Oriento. Kiel Hispanoj kaj Portugaloj havas plej grandajn meritojn en historio de ekkono de Okcidento, tiel Poloj posedas plej grandajn meritojn en historio de esploroj pri Oriento.

Rekonstruante la unuan terkarton de Oriento utiligis Maciej el M. ankaŭ raportojn de multenombraj polaj komercistoj, veturadantaj al rusaj landoj. Ĉi tie oni devas substreki, ke niaj interrilatoj kun Oriento komenciĝis multe pli frue. Ni havas historiajn datojn, ke en 1245 j. estas elsenditaj kiel deputitoj Jean Carpin Polonais kaj Benedykt Polonus, kiuj unu jaron kaj 4 monatojn migris de silezia Lignica ĝis limoj de Ĉinoj tra landoj de Kumanoj, ŝazaroj, Kirgizoj tra Buĥario kaj teroj de nombraj aroj tataraj.

En plua akiraĵo sur kampo de l' geografio en Polujo oni devas registri eldonon de unuaj polaj landaj terkartoj de Bernard Wapowski, en j. 1528 en Kraków, de krakova presisto Floriano Ungler. Pri forta geografia movado en tiu tempo pruvas multaj eldonoj de polaj libroj, kaj troviĝantaj en Jagellona Biblioteko multaj eldonoj de Ptolomea Geografio el XV kaj XVI jrc., Kosmografio de Münster, provizita de terkartoj kaj fama Atlaso marista de Baptisto Agnese.

Krom la menciita jam globuso postkolumba Bibl. Jag. posedas de tiuj tempoj ankoraŭ 7 aliajn terglobusojn. Krakova observatorio havas globuson el 1751 j., Toruń 2 globusojn el XVIII jrc., riĉaj kolektoj de Stanisław August Poniatowski enhavis en 1781 j. kvin globusojn ĉielajn kaj kvar terajn de alta historia valoro. Kie ili nun estas, ni ne scias.

La plej maljunaj monumentoj de pola kartografio, konservitaj en Kraków, atingas XV jrc., sed sur ilian fronton elpaŝas manskribaj skizoj de teroj de Krucordeno el unua duono de XV jrc. aldonitaj al kodekso de Sędziwój el Czecho. Plue al antikvaj restaĵoj de historia kartografio apartenas terkartoj de Grodecki, terkartoj de Oświęcim'a kaj Zator'a Princlandoj, de St. Porębski. La terkarto de Grodecki kaj ĝiaj kelkaj similajoj kun argumentadoj de Długosz, vivanta en XV jrc., pruvas laŭ prof. Wł. Semkowicz, ke Długosz jam la terkarton uzis, kaj eĉ la saman terkarton povis uzi Grodecki, kartografo el XV jrc., kio sekve revindikis Długosz'on ne nur kiel unuan geografon, sed samtempe kartografon polan. (Finota).

Dr. Adam Gadomski.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Nunjara Pollanda Esperanto-Kongreso dum Pentekosto ne okazos. Precizaj informoj tiurilate aperos ĝustatempe.

P. E. D. refoje varme petas ĉiujn pollandajn Esperantistojn komenci jam nun kolekton de mono por la garantia fendo de la venontjara Universala Esperanto-Kongreso. Eĉ malgrandaj sumetoj estos danke akceptataj. Cetere tiuafere bonvolu relegi la pasintmonatan komunikon de P. E. D.

Pasportojn por Internacia Kongreso de Esperanto en Oxford prizorgas Ekzekutiva Komitato de P. E. D. Por plifaciligi la laboron ni petas la grupojn kolekti anoncojn de siaj membroj kaj sendi ilin kune al s-o Ludwik Kutscher, Kraków, Grodzka 9. Por kovri la kostojn de la pasportoj ni petas pagi al la adreso por ĉiu pasporto 8 zł. Ĉiu anoncado sen mono ne estos akceptita. Bonvolu ne prokrasti la sendon de Via anonco. Petu pri aliĝiloj.

Intencantaj partopreni pedagogian kurson de pastro Ĉe anoncu sin kiel eble plej frue, por ke ni povu ĝustatempe ricevi la bezonatajn pasportojn.

S-o J. Alfus, kasisto de P. E. D., ĝis nun en Kraków XXII, Al. Dembowskiego 10, deponi la 1. V. loĝas en Kraków, ul. Słoneczna 31/L. Bonvolu noti ŝanĝon de la adreso en Jarlibro de U. E. A.

SCIIGOJ PRI POLLANDA ESPERANTO- INSTITUTO.

La 13. V. okazis en Kraków ĝenerala kunveno de P. E. I., kiu elektis la unuan estraron. Estas elektitaj s-oj: ing. Ed. Kostecki — prezidanto, prof. O. Bujwid kaj ing. Eug. Tor — vicprezid., d-ro L. Dreher — gvidanto de lingva komisiono, J. Alfus — kasisto, T. Hodakowski — sekretario; s-oj d-ro Kupczyński, kuratoro de lerneja distrikto kaj d-ro M. Blassberg — membroj de la Estraro. La kunveno fiksas kotizon de membroj-subtenantoj je 12 zł. jare. Baldaŭ okazonta plua kunsido prilaboros laborplanon por la estonta periodo.

TRADUKA KONKURSO.

La plej bona tradukinto de ĉi subaj frazoj, kiu sendos sian ellaboraron laŭ la indikita adreso antaŭ la 15 de junio k. j. ricevos premie libro(j)n en valoro de 4 zł. La solvo de l' dua traduka konkurso aperos en junia numero de P. E.

Tradukon bonvolu sendi al: Dr. L. Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

1) Znany z tego, bardzo często strzela bąki*). 2) Wpadł na domysł, że byłoby to tylko niecne zakusy. 3) Wędrowcy pławili się w trawach po pachy. 4. W wa-

*) „Strzelać bąki” znaczy głównie popełniać błędy z powodu niezastanowienia się.

rze i wirze bitwy migotały raz po raz srebrzyste zbroje. 5) Ciągłe brzdziło mi twoje pytanie. 6) Kramarze rozłtasowali się na ulicach. 7) Głos jego wniakał do najgłębszych zakamarków duszy. 8) Podziwialiśmy, jak człowiek i artysta w nim męzniał. 9) Straszne było pokłosie wojny. 10) O, ten przybędą z za morza, to zdzierzysty kawaler! 11) Okazywał stale wrodzony wstręt do dworactwa. 12) Z powodu gorąca zwierzęta pociągowe narowia się i opierają. 13) Ani mi to nie w głowie! 14) Słów tych zwartych i jędrnych słuchano z zaciekawieniem i przejęciem się. 15) Na jego widok bierze miłych obrzydzenie. 16) Jak świat światem nie widziano większej nawały. 17) Został porwany przez przewalające się fale, jak zdźbło przez potok górski. 18) Biednym wygnańcom marzyła się cicha wioska rodzinna. 19) Zrzadka tylko spotykaliśmy osady pasterskie, sadyby i osiedla. 20) Twarz jego cechowała wyrazistość rysów. 21) Zmaganie się z zawistnym losem wyczerpało jego siły. 22) Dreszcz przejmując, słuchając o takim narażaniu się na niebezpieczeństwo. 23) Była to jakaś niewymierna wielkość. 24) Z pod zielonej darni sączyła się struga wody. 25) Bez tego można się obejść.

POLLANDA KRONIKO.

BIAŁYSTOK. La 14-an de aprilo n. j. okazis en la ejo de Z. E. S. funebra soleno pro la mortotago de la Majstro.

La prez. J. Sapiro en longa parolado skizis la vivon kaj idealon de d-ro Zamenhof. F-ino S. Gurwicz deklamis versaĵon „Je memoro de nia Majstro“ kaj f-ino R. Porozowska la versaĵon de Deŝkin „Al cel“.

La kursgvidanto A. Javorski en sia parolado akcentis la necesecon de praktika ekzercedo de la lingvo kaj alvokis ĉiujn resti fidelaj al la Fundamento.

Edziĝoj: Edziniĝis f-ino Sonjo Gurwicz kun s-ro Aleks. Bajnsztejn, membro de Zam. Esp. S-to en Białystok. Ni kore gratulas.

Edziĝis S-ro Ch. Bitterman, membro de Zam. Esp. S-to en Białystok kun f-ino D. Merejna. Ni kore gratulas.

BYDGOSZCZ. Post la 2-a komenca kurso estis ekzamenataj de la loka UEA-del., s-ro Prengel, entute 10 ĝelernantoj. Nun okazas supera kurso gvidata de Heinz Reinhold, kiu daŭros ĝis la fino de la lernejjaro.

KATOWICE. La Societo de Esperanto-Amikoj finis la dumvintran Esp-kurson, kiu estis gvidata de samideano Tichawski laŭ sia eldonita lernolibro „La Mondligvo“. Tiu libro pruvis sian mirindan taŭgecon, ĉar la lernantoj finis la kurson kun bonega sukceso. Ĉe tiu okazo la societo aranĝis la 12-an de Aprilo solenan fermon. Post profundspirita parolado disdonis la prezidanto, samideano Faruga al 20 ĝelernantoj, kiuj plej regule vizitis la kurson, nian Esp. insignojn kiel premion. La entuziasmo de tiu vespero instigis la partoprenantojn, tuj fondi en la Societo kantgrupon, kiu ĉiun sabaton ekzercos je la 8-a horo vespere. Por tiu celo samideano D-ro Sianożęcki afable disponas ĉambron en sia privata loĝejo. — En la urbdistrikto Załęże nuntempe gvidas samideano Filak 3 Esp. kursojn ankaŭ laŭ la nomita lernolibro, pri kiuj jam ekinteresiĝas la lernejestro de tiea lernejo por enkonduki nian lingvon en sia popollernejo. — Dum somero okazos diversaj ekskursoj. Ĉe tiu okazo trilos la novfondita kantgrupo belajn kantojn apud la gaja birdaro en belaj somertagoj.

KRAKÓW. En ejo de Esperanto-Societo okazis lastatempe jenaj prelegoj: la 14-an de IV. okaze de mortotago de nia Majstro parolis s-o d-ro Dreher pri ideoj de d-ro Zamenhof laŭtleĝinte ĉe tio elektitajn ĉapitrojn el la kongres-paroladoj de la Majstro. — La 28-an de IV. prelegis s-o d-ro Blossberg je la temo: La batalo de la medicino kontraŭ la maljuniĝado kaj morto. — La 7-an de V. parolis s-o Hodakowski pri esperanta fonetiko, la 14-an de V. s-ino d-ro Rosenthal pri vivo de Jonatan Swift kaj Daniel Defoe. — Superan kurson gvidas s-o Hodakowski.

KRÓLEWSKA HUTA. La 17. IV. okazis en Dom Polski ĝen. kunveno de Rondo Esperantista. Kompare al la unuaj 4 jaroj la pasinta jaro estis iom malfavora por la Rondo. Malgraŭ ĉiuj faritaj klopodoj la membraro malmultiĝis, tamen oni decidis en la nuna jaro per ĉiuj rimedoj plivigliĝi la Esp. movadon. En la pasinta jaro estis aĉetitaj libroj kaj aliaj Esperantaĵoj por pli ol 300 Zloty. La biblioteko de la Rondo nombras pli ol 60 librojn. La novan estraron eniris: Prez. S-o E. Kołodziej; vicprez. S-o B. Gerlich, sekret. S-o J. Weihs, 2-a sekr. S-o J. Kocek, kas. S-o K. Plona, bibl. S-o A. Gerlich. Konsilantoj: S-o D-ro H. Broder, S-ino Kompała. Rev. Kom. S-roj: A. Piec, Kompała kaj Sadto. Junulargvidantoj:

S-roj: B. Gerlich, J. Weihs. La 18. V. okazos solena finiĝo de Esp.-kurso kun publika ekzameno.

LUBLIN. Esp. kurso parte gvidata laŭ senpera metodo finiĝis kun kontentiga rezulto. Kafejo „Warszawska“ apud ĉefstrato Krakowskie Przedmieście 60 iĝis vere esperantista renkontejo, kie regule ĉiumerkrede en vesperaj horoj kolektiĝas diversaj samideanoj. La 16. IV. vizitis nian urbon s-o H. Szwarz d-ro de filozofio el Dijon (Francujo) kaj faris tre interesan preleĝon pri „moroj kaj kutimoj en Franclando“. — Belegaj afiŝoj pri Stockholma Ekspozicio estas elpendigitaj en murŝranketo de PEA kaj en Komerc-Industria Cambro.

LWÓW. En aprilo okazis tie ĉi solena memorfesto de D-ro Zamenhof. Post konkunka parolado de s-o D-ro Fels havis belegan legadon F-ino L. Fruchtówna „Pri la vivo de nia Majstro“. Poste sekvis diversaj deklamoj kaj tre sprita teatraĵo sub titolo „Korespondado“, originale verkita de nia poetino F-ino L. Fruchtówna. Per viva bildo kun kantado de nia himno „La espero“, finiĝis la bela vespero, kiu estis multe aplaudita. Post la prezentado okazis komuna fotografado.

ŁOMŻA. La 14-an de aprilo, okaze de la mortotago de nia Majstro, okazis funebra akademio en la ejo de la esperanta societo. S-ro S. Litvinski faris paroladon pri: „La vivo kaj verko de Zamenhof“. S-ro d-ro M. Perelman laŭlegis koncernen versajon de si mem verkitan. Sekvis ludo de ŝopenmarŝo kaj fine la tuta ĉeestantaro kantis la esperantan himnon. — Dank' al la klopodoj de la komitatanoj: S-roj Oltarz kaj Kotuński kun virin-komitato, estis aranĝita la 20-an de aprilo n. j. grandioza ĉiujara esperanta balo en la salono de „Hazomir“. Ĝi estis multnombre vizitita kaj tiamaniere ĝi multege servis al la propagando de nia afero. Dum tiu-ĉi balo oni elektis kiel esperanto-reĝinon por la jaro 1930, fraŭlino Sonia Gdańska el Białystok kaj kiel vic-reĝinojn f-inojn E. Dunoviĉ kaj F. Budniewska el Łomża.

SIEDLCE. Dum la monato marto k. j. vizitis la urbon s-o A. Oberrotman el Warszawa, dum Pasko-festoj venis por kelkaj tagoj s-ano Cz. Pruski, del. de UEA el Lublin. — Centro de l' Esp.-movado estas ĉi tie loĝejo de s-o B. Żmuda, del. de UEA, kies simpatia edzino kune kun du malgrandaj filoj bonsukcese finis Esp.-kurson.

STRYJ. Dank' al fervora propagando de UEA-delegitino s-ino Ziemand estas ĉi tie fondita „Societo Esperanto“ kun s-ro advokato Dombczewski, kiel prezidanto, kaj s-ino Ziemand kiel sekretario. La kunvenoj okazas ĉiusabate je la 20 horo en la sukerajejo „Corso“. — En la ŝtata klasika gimnazio okazas regula instruado de Esperanto kiel laŭvola fako en la sesa kaj sepa klaso. La direktoro estas favora al nia lingvo, malgraŭ ke li estas klasika filologo. Instruas prof. Resport.

WARSZAWA. Reorganizo de Estraro de Akademia Esperantista Rondo ĉe J. A. H. (Nowy Świat 21, telef. 404-29). Prezidanto: I. Dratwer, vicprezidanto kaj kasisto mgr. D. Nimowicz, ĝen. sekretario mgr. A. Wundhajler, sekretario D. Lindner, bibliotekisto M. Mazur, sekciestroj J. Fagot kaj M. Guterman. La Rondo intencas aranĝi grandan ekspozicion. Tiucele diversspeca propaganda materialo estas danke akceptata.

ANTAŬ LA XXIII-A EN 1931 EN KRAKÓW.

Preleĝo pri Polujo en Praha.

La 25-an de aprilo n. j. s-ro J. Šapiro, ĉefdel. de UEA por Polujo, prelegis en la Esperantista Klubo en Praha pri Polujo, speciale atentigante pri Kraków, la urbo de XXIII-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, la ĉefurbo kaj laborloko de nia Majstro kaj Białystok, la urbo, kie nia Majstro naskiĝis.

La preleĝo estis riĉe ilustrita per projekciaj bildoj, kiujn afable pruntedonis la eldonejo de „Ilustrowany Kuryer Codzienny“ en Krakovo kaj la Pola Legacio en Praha.

Ĉeestis pli ol 100 ĝeesperantistoj, kiuj varme ekinteresiĝis pri la venontjara kongresurbo kaj ĝoje kun aplaŭdoj akceptis la informon pri malaltaj vivkostoj en Polujo.

La prezidanto de la Klubo s-ro Koutek publike dankis la preleganton kun peto transdoni saluton al ĉiuj polaj ĝesamideanoj. Post tio la kluba sekretario atentigis la ĉeestantojn, ke „Pola Esperantisto“ en sia lasta numero aperigis simpatiajn artikolojn pri la ĉeĥoslovaka regnestro d-ro Masaryk kaj pri la laste mortinta verkisto Jirāsek. Tiu informo estis aplaŭde akceptita.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO, Ĉefdelegito: J. Ŝapiro, Lipowa 33, Białystok.

Konto ĉe PKO No 60.047.

OFICIALA BULTENO No 17.

JARLIBRO 1930. Konforme al nia anonco en la lasta bulteno la nova Jarlibro estos dissendata en la nuna monato al ĉiuj membroj, pagintaj sian kotizon por la jaro 1930.

NEREPAGINTOJ. La aprila numero de „Esperanto” estis dissendita nur al Membro-Abonantoj, repagintaj sian kotizon por 1930. Ni dissendos baldaŭ al ĉiuj nerepagintoj cirkuleron kun peto pri realiĝo. Post tempolimo, montrita en tiu cirkulero, ni enkasigos la kotizojn per la poŝto, alkalkulante la plikostojn, de ĉiuj membroj, kiuj ne respondos nian cirkuleron. Kiu deziras prokraston aŭ partopagojn, bonvolu nin plej baldaŭ informi. Ni esperas, ke ĉiuj pasintjaraj membroj bonvolos repagi sian kotizon. La Membro-Abonantoj kaj Subtenantoj povas, repagante la kotizon, aldoni ankaŭ 5 zl. por ĝui rabatitan jarabonon de „Pola Esperantisto”.

KONGRESA KARAVANO DE UEA. Pro eventuala organizo de kongresa karavano al Oxford ni petas ĉiujn partoprenontojn en la XXII Universala Kongreso de Esperanto informi nin tuj nedevige pri ilia intenco veturi al Oxford.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Majo 1930 UEA havis en Polujo 323 membrojn, el kiuj 3 DM, 7 MS, 213 MA kaj 100 M. Tiu nombro estas nesufiĉa kaj neniel povas imponi. Per grandnombra aliĝado al U. E. A. ni montru la vigecon de la esperantista movado en la lando de sekvontjara Universala Kongreso de Esperanto!

NOVAJ DELEGITOJ. Informo pri novaj Delegitoj aperos en sekvonta bulteno.

Białystok, la 1. 5. 1930.

J. Ŝapiro, Ĉefdelegito de UEA.

DE LA REDAKCIO.

Ĉiujn Redakciojn de Esperanto-Revuoj ni petas varmege repressi la gvidartikolon de ĉi tiu numero de P. E. sub titolo: „Jan Kochanowski”. Ni tute ne postulas, se estus embarase, indiki la fonton, el kiu ĝi devenas. Ankaŭ se estas nepre necese, povas esti forlasita la subskribo. Bonvolu alsendi laŭ nia adreso po du ekzempleroj da numero, en kiu la artikolo aperos. Pollandajn samideanojn ni petas sendi la numeron, aŭ kopion de l' artikolo, al eksterlandaj kun la peto traduki ĝin nacilingven kaj prizorgi ĝian aperon en kelkaj nacilingvaj gazetoj. Eksterlandaj samideanoj bonvolu plenumi nian varmegan peton! De Vi dependas tuta sukceso de l' entreprenita afero! Ekzemplerojn de l' koncernaj gazetoj (kun krajonsignita artikolo) bonvolu al ni havigi. — Aperigante en eksterlandaj gazetoj la artikolon Vi helpos multege al progreso de nia movado en nia lando, ĉar ni deziras alokule prezenti al aŭtoritatuloj taŭgecon de nia lingvo kaj ĝian disvastigon en la mondo.

Pro kompla manko de loko kaj absoluta financa neeblo pligrandigi ankaŭ ĉimonte amplekson de P. E., ni ne povas doni kutiman parton de la vortaraldono. — Ĉiujn rimarkintajn iajn ajn erarojn en la ĝisnun presita parto de la suplemento (jen presajn jen faktajn), ni petas sciigi pri tio s-on direktoron J. Orzech, II Gimnazjum państwowe, Tarnów — redaktoron de la aldono, por ke ni povu aperigi ĝustigon de ĉiuj rimarkitaj eraroj.

Ni ricevis jenan proponon:

Ĉu ne estus bona propagandilo aranĝi por pollandoj t. n. verdan libertempon. Oni povus elekti ĉarman angulon, ĝis nun malmultnombre aŭ tute ne vizitatan de libertempuloj kaj eventuale aranĝi komunan kuirejon. Mi estas certa, ke anoncus sin multaj samideanoj, povante malmultekoste pasigi la libertempon kaj havante okazon ekzerci nian lingvon. Mi tial proponas lokon ĝis nun malmulte vizitatan, ĉar nur tie oni povas lui malkarajn loĝejojn kaj malgrandaj elspezoj altirus samideanojn ne povantajn multe elspezi. Kion vi opinias pri tio?

Kun samideanaj salutoj prof. Resport, Stryj.

DE LA ADMINISTRACIO.

Kun granda plezuro ni komunikas ke ĝis nun enpagis jenaj anoj de Pola Esp.-Asocio por **Gazantia Fondo de „Pola Esperantisto“** sumon de 200 zł. nome:

Dro Jerzy Loth — 50 zł; Inĝ. Emiljan Loth — 50 zł; Wł. Miernicki — 35 zł; Dr. Jan Kostecki — 30 zł; prof. E. Cense — 10 zł; Inĝ. Szapiro — 10 zł; Inĝ. K. Tymiński — 10 zł; Adv. K. Cohn — 5 zł.

Aliĝu senprokraste

al 9-a eldono de

BES — Adresaro

de esperantistoj el ĉiuj landoj

kiu celas kolekti adresojn de ĉiuj esperantistoj. — Simpla aliĝo 0.50 Fsv., kun adresaro 1.— Fsv, kun portreto kaj adresaro 1.50 Fsv. —

Anonca paĝo 25 Fsv. — Postulu senpage detalan prospekton de l' eldonanto:

BES (Boh. E-Servo), POTSTEJN, Ĉhsl., Eŭropo.

Libreja Fakto de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS :

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.80
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Baŭucki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Baudouin — La arto de memdisciplino: Psikagogio	1.30
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bennsels — Ŝolandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Butler — Himnaro Esperanta	3.00
— Kantaro Esperanta	3.00
Campe — Robinsono Kruso	7.00
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.30
Conscience — La leono de Flandrujo	11.75
Czechowski — Podróż po świecie dostępna dla każdego	0.50
Czubryński — Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangtrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20

Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krijoj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseraj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hector Hodler — Lia vivo kaj lia verko	4.00
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ibsen — Imperiestro kaj Galileano	12.60
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10.	
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928	5.00
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929	6.00
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy — Norda vento; novelkolekto	1.30
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912	0.80
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Malgranda terbiblio	2.00
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.33
Poŝtkartoj (kun moto de Żeromski) 10 pecoj	0.50
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Sapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Ŝlosilo esper. en pola lingvo	0.60
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo“, podr. Esp.	5.00
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	2.00
Wells — La dormanto vekigās	5.00
Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10
Zawada — Pelny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.)	4.00

La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baĥaraĥ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.